

SCIENCA REVUO

volas

- (1) subteni la ĝeneralan sciencan nivelon de sia legantaro, pri ĉiaj temoj;
- (2) helpi al la fratiĝo de la homoj, libere diskutigante pri la disigaj konceptoj laŭ sciencaj normoj;
- (3) science studi la problemojn de la Esperantismo;
- (4) evoluigi la lingvon laŭ sciencaj bezonoj, surbaze de la principo de sufiĉo kaj neceso.

Por tiu celo ĝi bezonas ne nur redakcion kaj legantojn, sed ankaŭ verkantojn.

Vidu ankaŭ paĝon 3 de la kovrilo.

D-ro W. Manders

INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

ENHAVO

Interlingvistika parto

- Ĉapitro I | *La interlingvistiko kaj Esperanto.*
Ĉapitro II | *La naturalismo de Edgar de Wahl kaj Otto Jespersen.*
Ĉapitro III | *La naturalismo de IALA.*

Esperantologia parto

- Ĉapitro IV | *Taskoj de la esperantologio.*
Ĉapitro V | *La evoluo de Esperanto. Lingva korekteco.*
Ĉapitro VI | *Kompara esperantologio.*

prezo 2.25 Ned. guld. / £ —.5.— / \$ —.75

J. MUUSSES — ELDONISTO

Purmerend - Nederlando

Vol. 6-a. N-ro 3-a (23-a)

Paĝoj 81-120

15-11-1954

81

UDK 001(05) = 089.2(100)

SCIENCA REVUO

ELDONO DE J. MUUSSES PURMEREND NEDERLANDO

Sendependa revuo. Aperas kvarfoje jare. Ab.pr. Ned.gld. 5.-, \$1.50, aŭ egalvaloro.
Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.)

Redaktoroj : D-ro G. Hamming, D-ro G. F. Makkink kaj D-ro W. P. Roelofs. **Sekretario de la Redakcio kaj Rezentanto por I.S.A.E.** : G. F. Makkink, Eekhoornlaan 10, Bennekom, Nederlando. **Administracia adreso por abonantoj, kiuj ne estas membroj de I.S.A.E.** : J. Muusses, Purmerend, Nederlando, Ĝironumero 15062 - **Sekretario de I.S.A.E.** : S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16 nb, Johanneshov, Svedujo, Poŝtkonto 190976.

Enhavo p. 120.

409.82 : 413

NEOFICIALAJ VORTOJ EN NIA LINGVO

de DONALD R. BROADRIBB.

Dum la somero de 1952 la Akademio de Esperanto oficialigis la sufikson *end*. Jam antaŭe estis aperintaj ses oficialaj aldonoj al la Universala Vortaro de la Fundamento, kaj krome jam oficialiĝis tri aliaj afiksoj (*aĉ*, *ism*, kaj *mis*). Ĉar la lasta listo de novaj vortoj oficialigitaj (la 6a aldono) aperis en 1935, multaj personoj opinias ke la Akademio devus sekvigi sian sufiks-oficialigon per nova aldono (la 7a) al la U.V.

Ĉu aŭ ne devus aperi tia aldono ne estas la temo de ĉi tiu verko. Mi deziras prezenti la rezulton de studo pri la neoficialaj vortoj uzataj kaj uzitaj post la dua mondmilito, por okazigi publikan diskutadon pri ili, kaj helpi vortaristojn. El la vortoj prezentataj, la plej multaj originis en unu el la sekvantaj grupoj:

- a) Vortoj bezonataj pro nova invento, ekz.: televido/televizio/televisiono.
- b) Vortoj bezonataj pro konscio ke antaŭaj kombinaĵoj ne plene taŭgas. Ekz.: inventi, agnoski, inkubo.
- c) Vortoj bezonataj pro troa longeco de la jamaj vortoj, ekz.: aŭto, foto, a(d)vanci.
- ĉ) Vortoj bezonataj pro bezono esprimi novajn ideojn, ekz.: avantaĝo, cirklo, stumbli.
- d) Vortoj uzataj pro eksmodiĝo en la naciaj lingvoj de la vortoj el kiuj fontis la jamaj esperantaj, ekz. aŭtobuso (anst. omnibuso).

Endas agnoski ke la punktoj a, b, kaj ĉ nepre rajtigas al ni tuj serĉi novajn vortojn. Ĉe tiaj vortoj ne temas pri „poetismoj” aŭ „literaturismoj”, sed pri praktikaj bezonoj. Aliflanke, oni multe disputas pri la punktoj c kaj d. Ni legas, ekzemple, „anoj de la tria kategorio (t.e. neaktivaj esperantistoj) eble nur rememoras tion, kion ili lernis en lernolibro publikigita en 1912. Ili neniam aŭdis pri la prefikso *mis-*, la sufikso *-end*, aŭ vortoj kiaj *varo*, *grego*, kaj *inundi*.”¹⁾

Tiu argumento havas kelkan valoron. Ni nepre devas atente zorgi pri novaj vortoj; tamen vortoj jam uzitaj dum tridek aŭ kvardek jaroj ne estas „neologismoj” aŭ „novaj vortoj”. Tial, la argumento ne validas kontraŭ vorto trovebla en vortaro de 1912, aŭ sim.

Ĉi tie mi ne komentas la bonecon de la diversaj neoficialaj vortoj. Mi deziras prezenti la rezulton de studo de 4799 paĝoj da postmilita esperanta literaturo (vidu liston ĉe la fino de la artikolo), inkluzivanta 1083 radikojn neoficialajn, ekskludanta proprajn nomojn, landnomojn, kaj teknikajn vortojn. La suma uz nombro estis 8211.

El la pli ol mil radikoj nur kelkaj uziĝis plurfoje. Por ebligi al la leganto malatenti la evidente negravajn radikojn, mi prezentos la radikojn laŭ modifita alfabetum-aranĝo. Vortoj kiuj aperis en almenaŭ dek el la verkoj studitaj prezentiĝos unue, kun mallonga difino por ebligi al la leganto konstati la identecon de la vorto. La difinoj ne estas kompletaj, aŭ ĉiam tute precizaj. Poste sekvos vortoj el almenaŭ ses el la verkoj, ankaŭ kun difinoj. Fine mi donos simplan liston pri la vortoj uzitaj malpli ofte. Por ebligi trovi la malnovecon de la vortoj, mi indikos (kun la bonvola helpo de nia redaktoro S-ro Roelofs, kiu provizis informon pri tio), kie eble, malnovajn vortarojn en kiuj troviĝas la radikoj.

Neoficialaj vortoj uzitaj en almenaŭ dek verkoj.

Aŭt- Apokopo de la oficiala vorto aŭtomobilo; f. ²⁾, h. kaj a.: auto. Uzita 102-foje en sume 12 verkoj.

avantaĝ- Supereco aŭ afero donanta superecon, moralan aŭ profitan.

A.: advantage, f.: avantage, h.: ventaja. Uzita 80-foje en 15 verkoj. En la 1-a eldono de la P.V. ³⁾

1) D-ro William Solzbacher akademiano: La Evoluo de Esperanto kaj la Akademio, Amerika Esperantisto, julio-aŭgusto 1952, p. 59-60.

2) En la ĉi subaj listoj a signifas angle, f france kaj h hispane (Red.).

3) Por montri malnovecon, mi signis kie eble la vortojn por indiki ke ili troviĝas en:

P.V. Plena Vortaro de Esperanto, unua eldono 1930, aŭ dua eldono 1934 (fotorepresa en 1947),

cirkl- Regula rondo de 360°. A.: circle, f.: cercle, h.: círculo. Uzita 47-foje en 10 verkoj. En la antaŭ-parolo al la DC-EF ⁴⁾.

depend- Ne esti aŭtonoma; esti ligita rilate monon, postenon, ktp. En la P.V. ĝi listiĝis kiel derivaĵo de pend. A.: depend, f.: dépendre, h.: dependere. Uzita 43-foje en 13 verkoj. En la EED ⁵⁾.

drat- Metalfadeno. El germana radiko; a.: wire, f.: fil de métal, h.: hilo metálico. Uzita 36-foje en 12 verkoj. En la DC-EF.

eskap- Sukcese fuĝi el kaptiteco. A.: escape, f.: escaper, h.: escapar. Uzita 46-foje en 10 verkoj. En la 2a eld. de la P.V.

inkub- Terursonĝo. A.: nightmare, f.: cauchemar, h.: pesadilla. El la mitologia nomo Incubus, rare uzata en tiuj tri lingvoj. Uzita 17-foje en 10 verkoj. En la DC-EF.

kulmin- Plej alta pinto; la kuniĝo de ĉio. A.: culmination, f.: culminer (-i), h.: culminación. Uzita 29-foje en 11 verkoj. En la DC-EF.

mekanik- Meĥanik-, uzata pro deziro eviti ĥ. Uzita 40-foje en 10 verkoj.

persvad- Konvinki personon ion fari. A.: persuade, f.: persuader, h.: persuadir. Uzita 26-foje en 14 verkoj. En la DC-EF.

preleg- Parolado, lekcio publika. A.: lecture, f.: discours, h.: discurso. Eble modifo de privileg-. Uzita 183-foje en 11 verkoj. En la EED.

resum- Sumo de la ideoj faritaj; rediro mallonga. A.: resume, f.: résumé, h.: resumen. Uzita 64-foje en 10 verkoj. En la P.V. kiel derivaĵo de sum. En la DC-EF.

situ- Troviĝi, esti (loke). A.: to be situated, f.: être situé, h.: sitio (= -o). Uzita 72-foje en 14 verkoj. En la 2a eldono de la P.V.

sugest- Sugestii, diri instigcele. A.: to suggest, f.: suggérer, h.: sugerir. Uzita 43-foje en 15 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V.

svelt- Laŭmode maldika. A.: thin, f.: svelte, h.: esbelto. Uzita 14-foje en 11 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V.

teren- Grundo, agadloko, tero. A.: terrain, f.: terrain, h.: terreno. Uzita 96-foje en 16 verkoj.

trajn- Vagonaro de fervojo. A.: train, f.: train, h.: tren. Uzita 294-foje en 12 verkoj. En la DC-EF.

Neoficialaj vortoj trovitaj en pli ol kvin kaj malpli ol dek verkoj.

agnosk- Rekonu kiel ekzistantan, veran. A.: to acknowledge, f.: reconnaître, h.: reconocer. Uzita 28-foje en 8 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V.

asist- Profesie helpi. A.: to assist. Uzita 15-foje en 7 verkoj.

4) DC-EF: *Dictionnaire Complet Esperanto-Français*, de E. Grosjean-Maupin, la antaŭparolo verkita kiam ankoraŭ estis konataj nur du oficialaj aldonoj al la Fundamento, do ĉirkaŭ 1920,

5) EED: *Esperanto-English Dictionary*, de Millidge, 1912 & 1924.

- aŭdac-** Kuraĝa. A.: audacious, f.: audacieux, h.: audaz. Uzita 15-foje en 6 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V.
- bluf-** Fanfaroni por trompi. A.: bluff, f.: bluffer, h.: blufar. Uzita 14-foje en 7 verkoj. En la DC-EF.
- ĉampion-** Persono superinta aliajn sporte. A.: kaj f.: champion, h.: campeón. Uzita 34-foje en 6 verkoj. En la 1-a eld. de P.V.
- demonstr-** Filozofie pruvi; montri, eksponi. A.: to demonstrate, f.: démontrer, h.: demostrar. Uzita 16-foje en 7 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V.
- detektiv-** Persono polica aŭ privata, kiu esploras spurojn kaj solvas krimojn. A.: detective, f.: détective, h.: detective. Uzita 23-foje en 7 verkoj. En la DC-EF.
- distribu-** Dismeti, disdoni. A.: distribute, f.: distribuer, h.: distribuir. Uzita 13-foje en 7 verkoj. En la DC-EF.
- ekspedici-** Vojaĝo iom danĝera, al nekonata loko, kutime por science studi la regionon. A.: expedition, f.: expédition, h.: expedición. Uzita 102-foje en 8 verkoj.
- eksplik-** Klarigi, diri motivojn, strukturon, ktp. de afero. A.: to explicate, f.: expliquer, h.: explicar. Uzita 37-foje en 5 verkoj en tiu formo, kaj 3-foje en unu verko kun la formo espliki, sume 40-foje en 6 verkoj. En la 1-a eldono de la P.V.
- ekivalent-** Egala kvankam ne samspeca. A.: equivalent, f.: équivalent, h.: equivalente. Uzita 8-foje en 6 verkoj. Trovebla en EED.
- fekund-** Naskokapabla; p. pri kampo: kapabla produkti multon. A.: fertil, f.: fécond, h.: fecundo. Uzita 26-foje en 9 verkoj. En la DC-EF.
- film-** Substanco uzata en fotografio. Pro angla influo, universale uzata en unu sola formo: film. Uzita 54-foje en 9 verkoj. En la 1-a eldono de la P.V.
- firmament-** La ĉiela volbo. A. kaj f.: firmament, h.: firmamento. Uzita 9-foje en 6 verkoj. En la DC-EF.
- fot-** Fotografajo. A. kaj f.: photo, h.: foto. Uzita 31-foje en 8 verkoj.
- grunt-** Bleki kiel porko. A.: to grunt, f.: grogner, h.: gruñir. Uzita 15-foje en 7 verkoj. En la DC-EF.
- ĝangal-** Arbarego. A. kaj f.: jungle, h.: selva. Uzita 57-foje en 6 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V.
- his-** Levi supren, precipe per ŝnurtiro. A.: hoist, f.: hisser, h.: elevar. Uzita 16-foje en 6 verkoj. En la 1-a eldono de la P.V.
- hurl-** Krii, bleki strige. A.: to hoot, f.: hurler, h.: ?. Uzita 23-foje en 8 verkoj. En la 1-a eldono de la P.V.
- incendi-** Brulego, precipe de domo. A.: incendiary, f.: incendie, h.: incendio. Uzita 9-foje en 6 verkoj. En la 2-a eldono de la P.V.
- indian-** Indiĝeno primitiva de la Amerikoj. A.: indian, f.: indien, h.: indiano. Uzita 50-foje en 6 verkoj. En la DC-EF.

- invent-** Elpensi, originigi. A.: to invent, f.: inventer, h.: inventar. Uzita 43-foje en 8 verkoj. En la DC-EF.
- kaskad-** Akvofalo; laŭ la P.V.: malgranda akvofalo. A. kaj f.: cascade, h.: cascada. Uzita 11-foje en 7 verkoj. en la DC-EF.
- kemi-** Ĥemi-. Uzata por evita la ĥ. Uzita 44-foje en 6 verkoj. En la 2a eld. de la P.V.
- kin-** Distra film-montrado, aŭ teatro por ĝi, laŭ la P.V. ankaŭ projekciilo kaj genro de rubiaĵoj. A.: cinema, f.: cinéma, h.: cine. El la germana Kino. Uzita 23-foje en 7 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V.
- kod-** 1. Speco de signara lingvo. 2. Aro da leĝoj kompilitaj. A. kaj f.: code, h.: código. Uzita 3-foje en 2 verkoj kun la signifo *leĝaro* kaj 42-foje en 6 verkoj kun la signifo *lingvo*, sume 45-foje en 8 verkoj. En la DC-EF.
- koment-** Komentarii. A.: comment, f.: commenter, h.: comentar. Uzita 19-foje en 7 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V.
- kompleks-** Havanta multajn partojn. A.: complex, f.: complexe, h.: complejo. Uzita 13-foje en 6 verkoj. En la EED.
- komut-** Direkti elektran kurenton en alian cirkviton, aŭ en la cirkvito mem. A.: commute (neordinara signifo), f.: commuter, h.: conmutar. Uzita 13-foje en 6 verkoj. En la DC-EF.
- laboratori-** Laborĉambro, precipe por sciencisto. A.: laboratory, f.: laboratoire, h.: laboratorio. Uzita 24-foje en 8 verkoj. En la DC-EF.
- mekanizm-** Maŝina organismo. A.: mechanism, f.: mécanisme, h.: mecanismo. En la 1-a eld. de la P.V. kaj la EED, sub formo *meĥanismo*. Uzita kun ĥ unufoje en unu verko, kaj kun k 17-foje en sep verkoj, sume 18-foje en 8 verkoj.
- mistifik-** Ŝercrompi. A.: to mystify, f.: mystifier, h.: confundir. Uzita 17-foje en 6 verkoj. En la DC-EF.
- nervoz-** Nerva, sentema. A.: nervous, f.: nerveux, h.: nervioso. Uzita 67-foje en 9 verkoj. En la 2a eldono de la P.V.
- obsed-** Okupegi la spiriton. A.: obsess, f.: obséder, h.: obsesionar. Uzita 8-foje en 5 verkoj kun tiu formo, kaj 3-foje en 3 verkoj kiel obsced, sume 11-foje en 8 verkoj. En la 1-a eldono de la P.V.
- pitoresk-** pentrinda, beleta. A.: picturesque, f.: pittoresque, h.: pintoresco. Uzita 20-foje en 6 verkoj. En la DC-EF.
- psik-** La primitiva radiko de psikologo, psikologio, kc. Uzita 13-foje en 7 verkoj kun la formo *psik*, kaj unufoje en unu verko kun la formo *psiĥ*, sume: 14-foje en 8 verkoj. En la 1-a eldono de la P.V.
- rival-** konkuranto. A., f. kaj h.: rival. Uzita 18-foje en 9 verkoj. En la DC-EF.
- sabot-** Milite detruji kaŝe; detruji kaŝe iukiale. A. kaj f.: sabotage, h.: sabotaje (= -o). Uzita 32-foje en 7 verkoj. En la 2a eld. de la P.V.

- stabil-** Firma, nevarianta. A. kaj f.: stable, h.: estable. Uzita 24-foje en 8 verkoj. En la 2a eld. de la P.V.
- start-** Komenciĝi, komenci, funkciigi. A.: start, kaj iom slange f.: starter kaj h.: estartar. Uzita 15-foje en 6 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V.
- stok-** Provizo de varoj vendotaj. A. kaj f.: stock, h.:? Uzita 34-foje en 7 verkoj. En la DC-EF.
- strikt-** Severa, precizega. A. kaj f.: strict, h.: estricto. Uzita 15-foje en 7 verkoj.
- surfac-** Supraĵo, supra faco. A. kaj f.: surface, h.: superficie. Uzita 31-foje en 8 verkoj. En la DC-EF.
- ŝofor-** Aŭtomobil-veturigisto. A. kaj f.: chauffeur, h.: chófer. Uzita 19-foje en 6 verkoj. En la EED kun formo *ŝofer*.
- ŝok-** Surprizegi, precipe malplaĉe. A.: shock, f.: choquer, h.: choque (= -o). Uzita 28-foje en 7 verkoj. En la DC-EF.
- ŝtorm-** Ventego, kun aŭ sen akompanantaj fulmo kaj tondro, foje pluvo. A.: storm, f.: tempête, h.: borrasca. Uzita 32-foje en 9 verkoj. La ŝ anstataŭ s estas el la germana prononco.
- taksi-** Fiakro. A. kaj f.: taxi, h.: taximetro. Uzita 13-foje en 6 verkoj. Ne en la P.V.
- taŭz-** Laŭ la P.V.: tirskuante malkonfuzi harojn. A.: tousle, f.: echeveler(?), h.: alborotar. Uzita 20-foje en 7 verkoj. En la 1-a eld. de la P.V. Prononco angla sen la l.
- tun-** Pezunujo, aŭ speco de fiŝo. A.: ton, f.: tonne, h.: tonelada. Uzita 26-foje en 7 verkoj. En la DC-EF. La vokalo estas modifita laŭ la angla prononco, por eviti konfuzon kun *ton*.
- vaku-** Tute malplena. A.: vacuum (-o), f.: vide, h.: vacuo. Uzita 14-foje en 6 verkoj. En la DC-EF.
- vand-** Muro. El la germana Wand = muro. Uzita 14-foje en 6 verkoj.
- vila-** Somerdomo, kampodomo. A. kaj f.: villa, h.: quinta. Uzita 16-foje en 6 verkoj. En la EED.
- volb-** Arkformaĵo. A.: vault, f.: voûte, h.: bóveda. Uzita 15-foje en 6 verkoj. En la DC-EF.

Neoficialaj vortoj trovitaj en malpli ol ses el la verkoj studitaj.

Noto: La sekvanta listo entenas krom seriozajn proponojn ankaŭ multajn radikojn kreitajn pro nescio de la aŭtoroj pri la ĝustaj radikoj jam ekzistantaj, pro pens- aŭ skrib-eraroj, kc. Krome, multaj estas variantoj de radikoj jam havataj, ekz.: *antimoni* (anst. *antimon-*). Aliaj konsistas el radikoj oficialaj aŭ neoficialaj, kun neoficialaj afiksoj. Aliaj estas eble ne intencitaj kiel novaj vortoj, sed formitaj idiotisme laŭ nacilingva influo. Dubajn radikojn tiajn mi enparentezigis. La signo ^e indikas radikojn ne en la 1-a eldono de la P.V. sed en la Enciklopedia Vortaro de Wüster, kaj * indikas radikojn en neniu el la du¹⁾.

¹⁾ De la radikoj signitaj per ^e kaj per * multaj troviĝas en P.V. 2-a eldono kaj en la ĵus aperinta Suplemento al P.V. (Red.).

aboc, absolv, abstinenc, adekvat, adjunkt, adolesk^e, avanc, aerodrom*, aeronautik, aerostat, afekci, aglomer, aglutin, agr, agregaci^e, agresiv*, agrikultur, akomod, akre^e, akumul, akumulator, akustik, akvedukt, alah^e, alergi* alianc, alies, aliment, aliteraci, alkemi, aloj, alp^e (ankaŭ propra nomo), altruism^e, amator, ambasad, ambl, amen, amplif*, ampol^e, anagramatik* (sendube ŝercradiko), analfabet, analitik, anarkist, anatem, anemometr, anestezi^e, anhel, animal, ans, antagon* (kaj -ism), antarkt, anti-^e, (antimoni), antropozof*, apaĉ, aperitiv, apert, apokalips, apoteiz (aŭ intencita kiel apote-iz aŭ erarpenso), aprior, are, argan, arian^e, arj^e (ambaŭ eble propraj nomoj), arkanĝel*, arke, arkiduk, arkt, armistic*, arsenal, artikl, asafet*, asbest, ascend, asfiksi, asterisk, asteroid, ataŝe, atletik^e, atoksil^e, atol, aton*, atrofi, aŭl, aŭror, aŭspici, aŭtarki*, (aŭtent*), aŭtobus, aŭtodidakt, (aŭtonomi), aŭtosled*, avanc* (vidu ankaŭ: avanc), avangard, avenu, averi, baal* (biblia propra nomo uzita ĝenerale), babuŝ*, bakteriolog^e, balg, balz*, bangal^e, banked, barĝ, barok, beat^e, beb*, beduen^e, beletr, bend, benefic, beton, bigami, bilion, biokemi^e, bizanc^e, blag, blend, board, bohem^e, bolŝev- (-ik kaj -ism), bolt, bontempl (bon-templ?), bonz, bras^e, bravur^e (brav-ur?), bred, brevier, brig, bruske, budh^e (ankaŭ propra nomo), bufr, buldog, bule, bumerang^e, burokraci*, burokrat, bus*, celebr, celofan*, celuloid, centigrad^e, ciklostil*, cirkumcid, cirkvit, cis*, cizel, ĉabrak, ĉak, ĉasi, ĉirp, damn* (kiel blasfemaĵo), darvinism (propra nomo Darwin -ism, uzata ĝenerale), debit, decentraliz*, defensiv, defi, defraŭd^e, dekalog^e, deklin (dekl-?), dekor, delikt, delt, demis, deport (de-port?), deprim, dermatolog, der-^{viŝe}, desinfekt, deton*, devi, diagnostik^e, diagram, diakonis, difuz, dikci*, diktafon, dilat^e, diminutiv, dinam, dinamism (dinam-ism?), diocez, direkci^e, dirigent*, dirizi*, disert, disertaci, distinkt*, diverĝ, divident*, divisor*, dizert, docent, dolman^e, donjuan, donĵuan^e, donkihot^e, drast, drelik, dren, drezin^e, driv, droŝk, ekscentr^e, eksklud^e, ekskuz, ekspansi, ekspert, ekspertiz, ekspon, eksponent, ekspoz, ekstravaganc, ekvinoks, ekzalt, ekzotik, eldorad*, elektron, elimin, elit, elize, eman, emerit, empir, ent, entjer, eon^e, epidermologi*, epikarp, epikur, epos, era, erozi, erupt*, ese^e, eskadron, eskim^e, estet*, etap, etiked, etimolog^e, etn*, etnik^e, etnolog, etnologi, etos*, eŭfemism, eŭgenik^e, eŭtanazi*, evaku, event*, fakultativ* (fakultat-iv?), falt^e, fant^e, fantasmagori, fantastik*, farb, farĉ, farize, faŝ- (-ism kaj -ist), fat, fatalist (fatal-ist?), fatamorgan^e, faŭn, feder, federal*, fek, fetor, filatel, filistr, firma^e, fiziolog, fiziopatologi*, flaĝolet, flakon, flekci*, flus, fokstrot*, folk*, folklor, formaci, formalism, formol, formular (formul-ar?), forst, fortun, fosforesk, fosili, fotele, fotografi, fragmit, frajt, franciskan^e, frazeologi^e, frejt*, frekvenc, frekvent, frikativ, fuĝ, fulv*, furnitur*, fusil, futbal, galaks, galaksi, galant (senco: ĝentilkondukta), galici^e (ankaŭ propra nomo antikva), galvan, gamb, gap, garaĝ^e, gastronomi, gejsler, gelat, gen, gener, generator, genez, giĉet, gild, gine^e, gis, glace, globus^e, glos, glum, gobelen, goel (sporta termino), gol,

got^e, grac, gracile, grafik, grak, gral*, granti*, grapol, gratifik, gravit, gravitaci*, grum, ĝaz*, ĝentleman*, ĝip, ĝir, ĝiroskop*, halo (salutvorto), halucin, halucinaci, handikap^e, hast, heĝ, heĝir^e, hektograf^e, helen (antikva propra nomo), hemisfer, hen, herbari, hermet, hermetik, heter^e, hetrogen*, hiat, hibrid, hidalg^e, hidraŭlik, hidrografi^e, hidrolog, hidroplan, hidroponik*, higrologi^e, histrion, homogen, hormon*, hosan^e, hul*, human- (-ism kaj -ist, eble deriv. el la oficiala radiko human?), humid*, ĥirugi, idealist (ideal-ist?), ideogram*, ideologi^e, ignorant (= stulta), iĥtiolog, (en ^e iktiolog), ikonoklast^e, iluminaci^e, impet, implic, impregn^e, impresionalism^e, impresionalist^e, incident^e, individual*, indulgenc, infinitezim, inflaci, inic, iniciativ, iniciator, injekci*, injekt, inklud^e, inkandesk, inkrust, inkubaci^e, integr, interez, internul (intern-ul? Tiel en ^e), interogativ*, interpelaci, interval, intu^e, intuici, invest, ion^e (= la stilo iona), irigac, irigaci, islam (ankaŭ propra nomo), iv, iz, jad, jaĥt, jakt^e, jard (mariste kaj mezure), jehov^e (speco de propra nomo), jodl^e, jubil, jul^e, junt, ĵaluzi, ĵambore, kab, kabared*, kabaret, kaĥel (oficiale: kaĥel), kajak^e, kak, kaki^e, kalend, kaligrafi^e, kalori, kalorik*, kalot^e, kamaril, kamion^e, kamufl*, kanjon, kanot, kantik, kantin, kanzon, kaos^e, kapitol, karmezin, kapilar, kapriol, kartotek^e (karto-tek?), kasked*, kataklism, kejl, kentaŭr* (konata kiel centaŭr), kermes, kinematograf, (kinomatograf), kiosk^e, kirurg, kirurgi, klab, klaerik*, klan, klaŭn, klimaks^e, klink, klostrofobi^e, koagul^e, kialici, kobaj, kodak^e (el propra nomo), koher^e, kokain, kokerik, koktel^e, kolaps, kolb, kompakt, kompendi, koncip, kondens^e, koneks^e, konekt, konfidenci^e, konfiguraci*, konfirmaci^e, konglomer^e, kongru, konjunktiv, konskripci^e, konstelaci, konstip, konstitutiv*, konstrukci^e, kontest, kontingent, konverĝ, kooper, kooperativ, kopr^e, kordon, korektur^e, koreografi^e, koron*, korpulent, korpuskl, korus*, kosm, kosmograf*, koteri, kotop*, krag*, kral*, kramf, krampf, krank, krejcer*, kresĉend, kresel*, kreten, kriĥ*, kriket, krin*, krinolin*, krisoleg (krisol-eg?), krizalid, kroket, kromat, ksilogravur*, kubik*, kultiv*, kupl, kuplred* (?), kurent, kurtaĝ, kurtizab, kurz, kutr, kvadrant, kvadrilion*, kvak, kvalif*, kvalifik, kvartir*, kver, kvik*, kvorum, kvot, lakon, lampion, lanĉ*, lasciv*, latent, latin, latitud, laz*, legaci*, leksikologi, lektor, lez, licens*, lik^{or}*, likv, limerik*, limon*, limuzin*, lingvistik, linoleum (lin-ole-um?), lirl*, lisp*, log* (en loglibr), logi*, lokaliz, lombard, longitud, loturn*, lunĉ, lupe, maĉet*, magistr, magistrat, mahometan*, majuskla*, makiavel, makulatur*, mamon, maneken*, manikur*, manipulator, map*, maran*, marimb*, marseljez* (kant-nomo), masakr*, mastodont, matric, matron, mecen*, mecenat, mefistofel*, megafon, melanholi (oficiale: melankoli), memorand, memorandum*, memuar, merg, mesaĝ*, merkur*, metapsiki*, metalurgi, meteorolog*, mimeograf*, ministeri, minstrel*, minus, miocen, miraĝ*, misterie*, mizerikord*, modl, mole, monaster*, monografi, monokl, morfologi, morn*, moskit, mot, motocikl, motorcikl (mo^{or}-cikl?), mucid, muld, multiplik, musken*, mutaci, nadl, nan*, nargile*, navig*, nazal*, nazi*, nazist*, neglekt, nekropsi, ne-

krologi, (oficiale: nekrolog), neŭralgi, neŭtron*, niks*, nirvan*, nitrogen, nilon*, noci*, nokaŭt*, notic*, numeni*, nukle*, nupt*, obskur*, obstakl, obus, ofensiv, ofenziv*, ofert, ojstr, okupaci*, olimpi*, omaĝ, onomatope*, okr, opon, optim*, (orakl*), orelal*, orfeon*, organik*, ort, oscil, oz, pajac, palindrom*, padel, pagan, pajnt*, pakt*, pandar*, pane, panegir, paraŝut*, parcel, partikl*, partizan*, pasteŭr*, pasteŭriz*, pasion*, patriark, patric, pavilion*, paŭperism, pelagi*, peloton*, penicilin*, periferi*, periskop, perpendikl, perturb, pervers, piet*, pijam*, piknik*, pirog, plaĝ, planetoid, plasm, platon (-ism, -ist), plejd*, plonĝ*, plump*, plus, pob*, pojn*, poleks, polen, polonez*, portepe, poŭp, povr*, pralin*, pre-*, precesi*, precedenc, precedent*, prepost, preskrib, prestiĝ, prim, primar, primus*, procez, produktiv (produkt-iv?), profilakt*, proklamaci*, prokur, prokuror, prolet, promoci, proskrib, proton, protozo*, proviant, pru, prud, pseŭd, psikiatri, psikoz*, puli, pulp, pund*, pure*, radium* (nomo de elemento), raĝa* (PV raĝao), raked, rapsod*, rapsodi*, rar*, ratal*, ravin*, razen*, recit*, refer*, referat*, referendum, reflekt, refrakt, regres, rekonvalescent*, rekvizit*, relikv*, renegat, renom, rentgen (propra nomo uzata ĝenerale), reparaci*, replik*, reptili, respons*, retro, retrospekt*, revers*, rezid*, rezoluci, ripost*, rival, rivel, robinzon*, robust*, rotaci*, rudiment, run, sad-* (-ism kaj -ist), sakr*, sakrilegi, sakristan*, samaritan* (propra nomo ĝenerale uzata), sanatori, sandviĉ*, sanitar*, sanktbernard (sankt-bernard? nomo de hundo), satelit, sapeist (sape-ist?), satirus, seanc*, sediment, sekstant, sekundar, semantik*, semid*, sens, ser, serp, serum, sferoid (sfer-oid?), siest*, sigl*, sin, sindik, sinizol*, sir*, sismograf, skafandr*, skat*, ski, skeĉ*, skolopendr, skolt*, skun, slang, sled*, slojd*, smoking*, snob*, snon*, solicator*, sombr*, spartan (spart-an?), specif*, splint*, spont, spontan*, sporad, splis*, spur*, stadion*, stafet, stagn, staj*, stak, stampf, stand, stapl*, statut, steat*, stereoskop, stereotip, steril*, sterling, stetoskop*, stif, stilz, stok*, stomp*, strand, strangol*, strateg*, stratosfer*, strob*, strop*, stuf, stumbl*, stupor*, sublim*, subtrah, superflu (super-flu?), superintendent (super-intendant?), suplement*, suplik*, surogat, surplis, surrealism*, suveren, suspir, ŝablon, ŝakt, ŝalte, ŝejk*, ŝik, ŝkut*, ŝlak, ŝmink*, tabu, tajd, tajp*, tanatologi*, tang, tank, tatar*, taŭr*, tek*, teknolog(i), telefot*, telegrafi*, telepati*, televid*, tempest, tenac*, tenajl*, tenis, tensi, terciar, term, terminolog, teror, test, tiktak*, timbr*, timid*, tin, tipi*, tonal*, trabant, trad*, trak*, traktor, tranc*, tranĉe, transakci, transcend*, transfuz*, transvers, traŭb, trejn*, tret, trilion*, trist*, trubador*, truso*, tundr, turnament* (oficiale: turnir), ultra*, ulul, uni*, uzin*, vagabond*, valut, valv, vandal, variete, varp, vascil*, vegetiv*, veld, ventral*, ventrilokv*, vespr, viatik, virus*, vitamen*, vitamin*, vitrin, vodevil*, vokiv*, vokt, volapuk* (ankaŭ propra nomo), volt, vot.

Mia studo montris sume 69 radikojn uzitaj en almenaŭ kvin verkoj. Sen-

dube ili meritas atenton de vortaristoj kaj eble la Akademio. Aliflanke, proksimume mil radikoj troviĝis, kiuj ne sufiĉe uziĝis en la ĝenerala literaturo por meriti atenton kiel vortoj de la „komuna vortaro“. Kelkaj, malmultaj, el ili tamen probable pliuziĝos dum la paso de tempo.

Verkoj studitaj: (nur la prozaj partoj):

Alico en Mirlando kaj Trans la Spegulo de L. Carroll (trad. Broadribb, ankoraŭ ne eldonita sed en manuskripta formo).

Antonio kaj Kleopatro de Shakespeare (trad. Andrew). Eldonis EPC en 1947. Konsiderita kun *Gajaj Edzinoj de Windsor* (trad. Andrew, eld. EPC 1948) kiel unu verko.

Brulanta Sekreto de Zweig (trad. Schwerin), eld. EPC 1949.

Ĉe la Sanktaj Akvoj de Heer (trad. Bader, le Brun, Schmid), Eld. Societo Esperanta, 1951.

Esperanto, gazeto de UEA, januaro 1950 - aprilo 1952. Eld. Societo Esperanta, 1951.

Esperanto, gazeto de U.E.A., januaro 1950-aprilo 1952.

Esperantologio (la tri aperintaj kajeroj).

Ferio kun la Morto de Lindqvist, eld. Dansk Esp. Forlag, 1948.

La Fino, de Bernadotte (trad. Engholm), eld. ESE 1946.

Franca Esperantisto januaro 1951 - aprilo 1952.

Ĝoja Podio de Schwartz, eld. ECL 1949.

Inter Sudo kaj Nordo de Szilágyi. Eld. ESE 1950.

Invito al Ĉielo de Sayers. Eld. Ziegler, 1949.

Kiso de la Reĝino de Najivin (trad. Staritsky), eld. EPC 1950.

Kredu Min, Sinjorino de Rossetti, eld. HDE 1950.

Londonanidoj de Munns. Eld. EPC 1946.

Miru, Pensu, Ridu de Bennemann. Eld. HDE 1950.

Morto de Trajno de Crofts (trad. Stuttard), eld. EPC 1948.

La Nevenkebla Ĝeno de Thijssen (trad. Faulhaber). Eld. FLE 1947.

Printempo de Morto de Zilahy, (trad. Spierer). Eld. ESE 1947.

Sep Fratoj de Kivi (trad. Setälä). Eld. Setälä 1947.

Vivo Vokas de Engholm. Eld. ESE 1946.

kaj grupe: *Esperanto 60-Jara* de Degenkamp (eld. FLE 1947), *Interlingvistiko kaj Esperantologio* de Manders (eld. Muusses 1950), kaj *Lernu Esperanton* de Querello (eld. Querello, 1947-1948-1949).

Vortoj en la titoloj de libroj ne konsideriĝis en la studo.

ĈU ONI POVAS VIDI LA ATOMOJN?

de Prof. D-ro HUGO SIRK.

Prelego en Internacia Somera Universitato, Parizo 1950.

La unuaj jaroj de la 19-a jarcento vidis la reviviĝon de la atomteorio, kiu sporade jam ekde la antikveco ludis kelkan rolon en la natursciencoj. Post kiam Lavoisier konstatis la konserviĝon de la maso ĉe kemiaj reagoj kaj Proust montris, ke du kemiaj elementoj kombiniĝas al difinita kombinaĵo ĉiam en la sama proporcio de siaj masoj, ke ekzistas *konstantaj proporcioj*, tiam la angla kemiisto Dalton komencis pripensi, kiel oni povas klarigi tion per la hipotezo, ke kemia elemento konsistas el atomoj, do el korpeoj inter si egalaj, neniel divideblaj kaj ne aparte videblaj pro sia eteco. Per tiu hipotezo li povis facile klarigi tion, kion oni jam sciis, kaj krome li konkludis el ĝi jenon novan: Se du elementoj kombiniĝas al du diversaj kombinaĵoj, la masoj de unu elemento kombinitaj kun la sama maso de la alia interrilatas kiel racionalaj nombroj. Li tiel konceptis la leĝon de la *multoblaj proporcioj*. Poste li konvinkis sin per kemiaj analizoj, ke estas efektive tiel! La rezultojn de siaj esploroj Dalton publikigis sub la titolo „*A New System of Chemical Philosophy*“ (Nova sistemo de kemia teorio) en 1808. Estas grave, ke Roscoe kaj Harden¹⁾ povis pruvi per la eltrovitaj taglibroj de Dalton, ke li unue konceptis la atomteorion kaj nur poste faris la analizojn pruvantajn la leĝojn de la multoblaj proporcioj. Unu jaron post la apero de la libro de Dalton la franca kemiisto Gay-Lussac montris, ke la volumenoj de kombiniĝantaj elementoj kaj ankaŭ tiu de la rezultanta kombinaĵo interrilatas kiel entjeroj, se ili estas mezurataj en gasa stato sub egalaj eksteraj kondiĉoj, sub egalaj premo kaj temperaturo. El tio konkludis la itala kemiisto Avogadro en 1811, ke la gasoj enhavas en egalaj volumenoj sub egalaj eksteraj kondiĉoj egalan nombron da molekuloj. Sub molekulo oni komprenas la plej etan parton de kemia homogena korpo, kiu havas ankoraŭ la samajn ecojn kiel la tuta korpo. Ankaŭ la molekuloj de elementoj konsistas ĝenerale el kelkaj, plej ofte el du atomoj de la elemento. Per la hipotezo de Avogadro la kemiistoj ricevis la eblon efektive determini la relativajn masojn de la atomoj, la tiel nomitajn atompezojn. La tuta brila evoluo de la organika kemio en la 19-a jarcento baziĝas sur la atomteorio kaj la hipotezo de Avogadro.

Tiel evidentiĝis la granda eltroviga valoro de tiu teorio, kiu fariĝis tiamaniere la konstanta gvidilo por la esploroj de la kemiistoj. Sed ĉu la hipo-

1) Roscoe kaj Harden: *New View of the Origin of Dalton's Atomic Theory*. Aperis ankaŭ en germana traduko de G. W. A. Kahlbaum: *Das Entstehen der Dalton'schen Atomtheorie in neuer Beleuchtung*. Leipzig. Ambrosium Barth 1898.